

**Naŭlingva Etimologia Leksikono** de *Louis Bastien*. Nova eldono, 1950, Esperanto Publishing Company; bindita; prezo 12 ŝil. 6 p.

Laŭ la antaŭparolo de tiu ĉi dua eldono la Naŭlingva Etimologia Leksikono celas:

- 1°. Montri devenon de la esperanta vortaro kaj pruvi ĝian internaciecon.
- 2°. Plifaciligi memoriĝon pri radikoj al tiuj, kiuj iom konas aliajn lingvojn.
- 3°. Veki la intereson de la leganto, montrante rilatojn inter vortoj de esperanto kaj de lia propra lingvo.

Ĉu la libro respondas al tiu celo? Ĝenerale jes, kvankam certe restas kelkaj dezirindaĵoj. Pristudante ĝin oni estas ofte trafata de interesa parenceco inter vortoj ĉu diverslingvaj, ĉu en Esperanto mem. Precipe al la kompreno pri parenceco de Esperantaj vortoj inter si multe kontribuas la filologiaj notoj, kie la verkinto grupigis Esperantan familion derivitan de unu vorto. Prave la verkinto enkondukas la leksikonon per konciza klarigo pri la deveno de la nuntempaj eŭropaj lingvoj kaj per fonetikaj rimarkoj. En multaj rilatoj tiu ĉi verko estas do lerniga kaj tiuj samideanoj kiuj havas iom da lingva interesiĝo, kun plezuro serĉos kaj trovos instruon en ĝi.

Aliflanke mi ne povas prisilenti kelkajn malpli bonajn ecojn. La sufiĉe multaj prezeraroj estas bedaŭrindaj kaj nepre devus esti evititaj en leksikono, kie la formo de la vortoj ja speciale gravas. Tamen tiuj eraroj, kiel Esp. pantaleno anst. pantalone, partra anst. patra, bandaĝlo anst. bandaĝo, itala: *documento* anst. *documento*, ne estas la plej gravaj. Pli gravaj estas eraraj vortoj kaj tradukoj, kiel sur paĝo 178 latina: *mathematicus*, kiu signifas „matematikisto”, sed laŭ tiu ĉi verko estas samsignifa kun matematiko. Sur la sama paĝo mi trovis ankoraŭ du erarojn en la latina kolono: „milo da paŝoj” ne estas „*millia passuum*”, sed „*mille passus*” kaj „mielo” ne estas „*melo*” sed „*mel*”. La germana vorto „*miserabel*” ne signifas „mizerulo”, sed „mizera”. La vorton „vaki” *Bastien* derivas de lat. „*vacanta*”; korekta estas „*vacare*”. Bedaŭrinde ankaŭ mankas vortoj, ekz. lat. „*legenda*” ĉe legendo, „*supponere*” ĉe supozoj, „*bustum*” ĉe busto, „*missa*” ĉe meso.

Fakte la elekto de la ok lingvoj (latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa) estas iom arbitra. Oni povus demandi, kial kvin romanaj lingvoj aperas flanke de nur unu ĝermana. Konforme al la tria suprenomita celo oni ŝatus vidi almenaŭ unu skandinavian lingvon kaj eble ankaŭ unu slavan krom la rusan.

Kompreneble en tiu okazo la helpo de pli da kunlaborantoj estus necesa. La problemoj de la elekto verŝajne restos ankaŭ post aldono de unu aŭ du lingvoj kaj eble neniam ĉiu leganto estos kontenta. Sed alia pli pozitive respondebla demando estas, ĉu enmeto de malnovgreka kolono ne estus rekomendinda, precipe por efektiviĝi la unuan punkton de la celo, esprimita en la antaŭparolo. Multaj modernaj vortoj troviĝantaj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj estas de greka origino. Tiujn vortojn *Bastien* pritraktis nekonsekvence. Parte li mencias ilin en latina formo (*metaphysica*, *metaphora*,

*metamorphosis*, *methodus*, *metropolis*, *martyr*, *mythus*, *periodus*, *philosophia*), parte la antikva origino mankas (ekz. de metempsikozo, meteoro, paleografio, panteismo, psikologio, entuziasmo, epidemio). Li eĉ tiugrade intermiksas latinajn kaj grekajn radikojn, ke li asertas en noto sur paĝo 184, ke la latina radiko *mist-* signifas kaŝita.

Ankoraŭ unu rimarko: la gramatikaj vortoj, kiel prepozicioj, konjunkcioj kaj adverboj, ne estas enskribitaj, ĉar „ilia klarigo apartenas al la gramatika morfologio.” Tamen estus interese vidi ankaŭ de tiaj vortoj la devenon.

Malgraŭ la nomitaj dezirindaĵoj ni devas esti dankaj al la verkinto kaj liaj kunlaborintoj pro tiu ĉi verko. Ĝiaj meritoj estas nekontesteble grandaj.

A. J. Middelkoop.

519.2 : 517.9

Prof. dr. O. Reiersøl: **Diferencialaj ekvacioj de specimenaraj distribuoj.**

Prof. dr. O. Reiersøl: **Transiro per diferencialaj ekvacioj de probablodensoj al karakteriza funkcio kaj inverse.<sup>1)</sup>**

Eldonoj de la Sociekonomia Instituto de la Universitato en Oslo.

La traktajoj enhavas multajn statistikajn terminojn, precipe en la enkonduko de la unua, sed ankaŭ dissemnitaj tra la tuta teksto. Kelkajn el ili la aŭtoro prenis pretaj el la internacia slango, aliajn li adaptis al Esperanto. El la unua grupo mi nomas „*populacio*”, „*parametro*”, „*distribua funkcio*”, „*varianco*”. Pri la akceptado de kelkaj terminoj oni povas diskuti.

„*Populacio*” havas plurajn signifojn, kiujn oni renkontas en la statistiko.

Biologia populacio estas kuno el malsamaj statistikaj populacioj. La vorto „*parametro*” havas malsamajn matematikajn signifojn. „*Distribua funkcio*” estas malbela termino, ĉar miaopinie la probablodensoj distribuas la observojn. Tamen mi konscias ke estas malfacile, malligi nin de la internaciaj kutimoj.

En la dua grupo troviĝas ekz. la vortoj: *observaro*, *laŭhazarda*, *taksilo*, *specimenaro*, *specimenara distribuo*, *specifo*, *ekspekto*. Kelkaj terminoj estas bonegaj, ekz. *specimenaro*, *laŭhazarda*, *specifo*, *ekspekto*.

Pri „*observaro*” oni povas disopinii. Imagu ke oni pristudas la konsumkvanton de vino. Eble tiun influas la uzo de biero, de brando, ktp. Nu, ĉiu-monate oni observu tiujn tri kvantojn. La tri nombrojn la aŭtoro nomas *observaro*. Observo do ĉiam estas unu nombro. Mi preferus nomi observo la nombraron pri unu monato, kaj la aron da nombraroj pri la sinsekvaj monatoj mi nomus *observaro*. Nur tiel la gradoj de libereco dependas de la nombro de la observoj. Krome, se oni foje observas nur du kvantojn, oni ne havas informon do ne observon.

<sup>1)</sup> Ĉi tiu traktajo aperis ankaŭ en la portugala matematika revuo „*Portugaliae Mathematica*” 10 [1951] 71–80. Ni esprimas nian gratulon kaj al la aŭtoro kaj al la redakcio de la menciita gazeto.

Pli grava estas mia malkonsento pri „taksilo”, kiu termino indikas rezulton de taksado. Por klarigi mian opinion mi devas iomete klarigi la esencon de la statistiko matematika.

Mi jam supozis ke ni pristudas la konsumon de vino. Imagu ke ni observis dum du jaroj. Fine ni volas scii la konkludojn. La konkludo nepre ne devas esti, ke dum la observaj jaroj la rilato inter la kvanto da vino kaj la kvantoj da biero, da brando, ktp. estis tia kaj tia. La observaj jaroj jam forpasis kaj ne plu havas intereson. Utila konkludo estas: la rilato estos tia. Fakte oni konkludas kompromise: la rilato ĝenerale estas tia (do estis kaj estos). Oni uzas la observaro(j)n el la observaj jaroj kiel specimeno el la tuto de ĉiuj eblaj observaroj el ĉiuj jaroj (do: el la populacio, la eblajaro).

Nun oni kalkulas kelkajn nombrojn el la specimeno, kaj asertas, ke tiuj nombroj validas kiel parametroj de la populacio. Tiu aserto, tiu transiro de specimeno al populacio donas la taksan aspekton. Ĝi faras ke la kalkulaĵo estas nur taksajo.

Supozeble prof. Reiersøl pensis tiel: Mi kalkulas nombrojn; kalkulado ne estas taksado, do la rezulto ne estas taksajo; mi kalkulas ĝin ĉar mi volas taksati la valoron de parametro, do la kalkulaĵo estas taksilo. Kontraŭ tio mi volas diri, ke la taksado devas havi rezulton, do devas ekzisti taksajo. Nu, la taks-ago ĉiam estas ke oni prenas la „taksilon” kiel plej bonan havatan valoron por la parametro, do kiel taksajon.

Laŭ mi la specimeno, la observaro, estas taksilo, same kiel la formulo laŭ kiu oni kalkulas la taksajon. Eĉ estas dezirinde uzi la terminon taksilo speciale por la uzeblaj formuloj. Ekz. ĉe la normala distribuo oni povas diri ke la aritmetika meznombro estas pli bona taksilo por la ekspekto ol la mediano.

La termino „specimenara distribuo” ne estas nepre maltaŭga. Oni devas pensi pri specimenaro por kompreni tiun distribuon. Do ekzistas rilato inter ambaŭ. Tamen mi preferas „taksaja distribuo”, ĉar la rilato inter la distribuo kaj la taksajo estas pli forta; temas pri distribuo de la eblaj valoroj de la taksajo.

Tre interese estas ke la aŭtoro uzas analogojn de la latina ablativo absoluta, ekz. sub (5.2): Linia diferenciala ekvacio de  $f(x)$  estante donita, ni povas trovi ..... Tiu konstruo ne estas kutima en Esperanto; oni ofte trovas ĝin en Angla matematika literaturo. Persone mi ŝatas la konstruon, ĉar mi ŝatas gramatikan malrigidon.<sup>1)</sup>

En la teksto mi trovis kelkajn pliajn malgravajn mankojn, kaj kelkajn

<sup>1)</sup> Ĉi tiu konstruo estas ĝenerale rigardata kiel erara en Esperanto. Plena Vortaro (sub *Absoluta*) rimarkigas: *Zamenhof* insiste avertis, ke tia dirmaniero estas tute kontraŭa al la spirito de Esperanto, en kiu la adverba participo devas ĉiam rilati la subjekton de la ĉefa propozicio. — Mi supozas ke temas pri simpla(j) skribero(j) de prof. Reiersøl, kaj nepre ne rekomendas la uzon de tiaj konstruoj. — *La Redaktoro*,

tajperarojn; kompreneble! Mi supozas ke „proceso” anstataŭ „procedo” estas unu el ili.

La enhavon de la traktaĵoj mi povas resumi mallonge. Ĝis nun oni kutime klopodis doni la specimenarajn (taksajajn) distribuojn en formo de integralo. Prof. Reiersøl donas ilin en formo de diferencialaj ekvacioj. Same, en la dua traktaĵo, li donas la karakterizan funkcion en formo de diferencialaj ekvacioj. Laŭ la aŭtoro la nova metodo ofte estas uzebla kiam aliaj metodoj malsukcesas.

La traktaĵoj ne pritraktas la demandojn, kiel oni devas uzi la diferencialajn ekvaciojn. Mi ankoraŭ ne povis kontroli ĉu tio estas trovebla en la referencoj. Verŝajne la plimulto de la statistikistoj jam scias tion, almenaŭ se oni venis tra la matematiko al la statistiko. Ĉu la ne malmultaj kiuj venis tra biologio aŭ ekonomio al la statistiko tuj komprenas la ĝustan uzon mi dubas.

Tamen mi ne dubas ke prof. Reiersøl pravus en siaj pretendoj. Tial la traktaĵoj estas tre gravaj. Ni povas gratuli nin mem, ke ni ricevis tian elstaran studaĵon en nia fakliteraturo.

G. Hamming.

289.6 + 92 (G. Fox)

La Societo de Amikoj (Kvakeroj) kaj ĝiaj esencaj trajtoj, de Edward Grubb M.A. kaj George Fox, Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj), 1624—1690, de Henry van Etten.

Jen du broŝuroj eldonitaj de „Friends Service Council”, Friends House, Euston Road, Londono, N.W. 1, Britujo. Ili ampleksas respektive 20 kaj 16 paĝojn, kaj kostas 3 pencojn po + afranko. Ili taŭge informas pri ĉi tiuj kristanoj, por kiuj ne ĉefas formoj kaj dogmoj, sed kiuj klopodas laŭ siaj ebloj vivi laŭ la ekzemplo de sia granda antaŭulo. Ja tio certas, ke se ĉiuj homoj estus kvakeroj, la mondo aspektus alie.

W. P. R.

En „Progress of Theoretical Physics” (5 696—717) d-ro Z. Koba aldonis esperantlingvan resumon al anglalingva artikolo kies titolo estas „Note on a Lorentz-Invariant Integration in the Quantum Field Theory”. La numero (4a) en kiu ĝi aperis estas speciala numero, eldonita je la honoro de la Nobelpremiita Hideki Yukawa, kaj enhavas kontribuojn ankaŭ de multaj eŭropanoj kaj amerikanoj, inter kiuj pluraj Nobel-premiitoj.

D-ro W. J. Nijveld denove publikigis kelkajn artikolojn en la nederlanda farbfaka gazeto „Verfkronek” kaj aldonis esperantajn resumojn. La tradukoj de la titoloj estas:

„Propecoj de Farboj kaj Farbtavoloj” (24 [1951] 16-18);

„Pri la Ebloj de Normigo de Farboj (24 [1951] 19-21).

En „Congressional Record, Proceedings and Debates of the 82<sup>a</sup> Congress, First Session” (de la Usona Parlamento) aperis „Extension of Remarks of Hon. Karl Stefan of Nebraska”, dediĉita al Esperanto.